## Redakta noto

La esploroj kaj posta artikolo de *W. Blanke* "Kiam estiĝis ISAE?" en la centjariĝa festkajero SR 3/2006 konfirmas, ke dum la dua Universala Kongreso de Esperanto (UK) en Ĝenevo 1906 oni decidis "principe", kaj dum la tria UK 1907 en Kembriĝo oni decidis "oficiale" pri la fondiĝo de ISAE. La kontribuo de s-ino *Blanke* finiĝas per la vortoj: "Per tio ni vidas pli klare ... ISAE havas du naskiĝdatojn".

Dankon, kara *Wera*! Ni do havas la rajton festi ankaŭ en tiu ĉi jaro!

Tion ni bezonas! Ĉar venis por niaj jubileaj festkajeroj tiom multaj kontribuoj de fidelaj legantoj de Scienca Revuo (SR) kaj bonvolaj aŭtoroj, ke ne eblis publikigi ĉion en la 2006-a SR-jarkolekto kaj vere necesas la "dua naskiĝdato en 1907" – por daŭrigi la sinsekvan publikigadon de la ricevitaj kontribuoj en festkajeroj ankaŭ en la jarkolekto 2007 de Scienca Revuo.

Ni havas pluan kaŭzon vere festi la centjariĝon de ISAE – ne nur por daŭrigi la publikigon de pliaj jubilekonferencaj prelegoj – sed ankaŭ pro la fakto, ke plifortiĝis la estrara kaj gvida instancoj de ISAE. Ekde la centjariĝ-omaĝa renkontiĝo tegmente de la Esperanto-Kasteleto en Tavoleto

– ni havas **novan ĝeneralan sekretarion**: *D-ro José Antonio Vergara* estonte okupiĝos pri tiu grava pozicio kaj krome servos ĉe UEA kiel "Komitatano A de ISAE" por la sekva 5-jara periodo;

– ni havas **novan landan delegiton por Ĉeĥio**: tiun taskon prenis sur sin *Marek Blahuš* – aktiva, lerta kaj komputilsperta studento. Scienca asocio treege bezonas tion en la nuntempe tiom rapide evoluanta retkomunikteĥnika epoko. Nia nova ĉeĥa delegito ankaŭ zorgos ke aperu retpaĝo de ISAE;

– ni havas **novan lingvan konsilanton**: *d-ro Endre Dudich* pretas helpi en la redaktado kaj kontrollegado de la manuskriptoj por Scienca Revuo – treege grava subteno por la redaktado de nia asocia organo post kiam ĉesis la kunlaboro de la ISAE-vicprezidanto pro grava malsano;

– ni havas **novan honoran membron**: *Rob Moerbeek*, honormembrigita dum la solena inaŭguro de la centjariĝfestado pro siaj grandaj meritoj en la plialtigo de la lingvaĵa kvalito de SR-tekstoj;

– kaj ni havas **novan redakcian komisionon**, kiu nun konsistas el la prezidanto, la vic-prezidanto, la ĝenerala sekretario kaj la du honoraj membroj de ISAE.



Por asocio, kies celo estas la regula eldono de scienca revuo, la lingvaĵa kvalito de la fakscienca tekstoj kaj la scienclingva ĝusteco estas la bazo de pluekzistado. Mi dankas al la aŭtoroj kaj la fidelaj membroj de ISAE, kiuj per kontribuoj kaj kotizoj vigligas kaj vivigas nian asocian organon, kaj al la landaj delegitoj kaj perantoj, kiuj zorgas por la prospero de ISAE pere de diskonigo de nia Asocio kun sia organo kaj same mi dankas al la kunredaktantoj kaj lingvaj konsilantoj, kiuj okupiĝadas pri tiu gravega tasko.

Por videble inkludi ankaŭ en la 2007-an jarkolekton de Scienca Revuo la pasintjare ricevitajn centjariĝ-omaĝajn kontribuojn, la freŝbakita honora membro *Rob Moerbeek* donas viglan, koncizan retrorigardon pere de

### Resumo pri la centjariĝ-omaĝa konferenco en la Esperanto-Kasteleto, Tavoleto/Italujo de la 24-a ĝis 29-a de julio 2006

"Jam en la alveturo tra *Cattolica* (apud *Rimini*) la multajn partoprenantojn atentigis pri la ravaj panoramoj de la italuja provinco *Le Marche* la stiristo de la aŭtomobilo kaj de ISAE, d-ro *Rüdiger Sachs*. Al la festa etoso ne malpli kontribuis liaj edzino *Christine* kaj du filinoj *Martina* kaj *Elisita*: ili gastigis kun senpretenda fona, foje fronta zorgo 41 sciencistojn kaj scienc-amantojn el 18 landoj.

UEA neniel ignoris sian fakan Asocion sciencan: alvenis gratula kuraĝigo de sciencfaka estrarano *Amri Wandel*. Inaŭgure parolis la urbestro d-ro *Mauricio Paolucci* pri la historio de sia 400 m alta Tavoleto, rekonstruita el milita detruo; poste UEA-prezidanto *Renato Corsetti*, kiu instigis rigardi antaŭen tiom pli, ke la ISAE-estraro pruvas ĝiajn grandajn meritojn; kaj flue interpretis *Michaela Lipari*. La ISAE-prezidanto, memoriginte la forpasintajn eminentulojn de nia Asocio, festparolis pri "ISAE centjara: estinteco, estanteco, estonteco". Li substrekis, ke la kontribuoj al la riĉa, tamen ne tro densa programo estas destinitaj por festkajeroj de Scienca Revuo.

Ne longe povis resti aktivuloj de la ILEI-konferenco samtempa en *Parma*. Sed ili ne lasis nin sen perlaj pruvoj de siaj scioj. Jam tuj *Aida Čižikaitė* montris la konservemon de la litova lingvo, ankoraŭ spegulanta la (rekonstruitan) vokalsistemon de la praa "hindeŭropa". *Věra Barandovská-Frank* paraleligis la planlingvajn organojn "Scienca Gazeto" kaj "*Schola et Vita*" (*Latino sine flexione*) kun la centjariĝo de ISAE kaj *Helmar Frank* traktis "kiel infiltrigi la Internacian